


AMERIKA ESPERANTISTO

La Monata Bulteno de la Esperanta
Asocio de Norda Ameriko

Joseph R. Scherer, President
Los Angeles, California



AMERICAN ESPERANTIST

The Monthly Bulletin of the Esperanto
Association of North America

Ernest G. Dodge, Ch. Ex. Comm.
Washington, D. C.

Joseph Leahy, General Secretary

Centra Oficejo 1517 H Street, N.W., Washington, D. C.

Central Office

VOL. 51, No. 7 - 10¢ per Copy - in Any Land - \$ 1 per Year - May 1937

N I NEPRE DEVAS PROGRESI !

Vortoj de la Prezidanto:- Kiam mi alvenis en Nov-Jorko, je la 10. Aprilo, ankoraŭ sur la S.S. President Roosevelt, mi trastudis multajn leterojn kaj la lastajn raportojn, ĉefe pri la progreso de EANA. Mi konstatis ke kelkaj sumideanoj malfruigis kun la pago de siaj membro-kotizoj. Se ili ne denove pagas sen plia prokrasto, oni ne povos kalkuli ilin kiel membrojn ĉe la jara raporto prezentota ĉe la jubilea kongreso de EANA. Ni gajnis multajn novajn membrojn depost la lasta kongreso en Detroit, kaj ni certe ne volas perdi iajn malnovajn. Ĉiu nomo gravas en nia klopodo pligrandigi la nombron de niaj membroj. Do nepre, rapide kaj senprokraste sendu viajn kotizojn al la Centra Oficejo! Tiel vi estos certaj ke via nomo aperos en la membro-listo de la jubilea jaro.

Se vi ne estos malsana - nepre venu al la 30-a jubilea kongreso de EANA en Washington! La loka kongresa komitato faras ĉion, por certigi tute unikan sukceson. Ili volas ke ni neniam forgesu la fest-kongreson en la usona ĉefurbo, okaze de la 50-jara jubileo de Esperanto. La Vaŝingtonaj gesumideanoj havas grandan taskon, se ili volas superi la kongresojn de Nov-Jorko kaj Detroit. Nur per via grand-nombra ĉeesto ili povas sukcesi.

Nia juna pioniro, Lee Stern de Cleveland, kuraĝe organizis la kolekton de 100,000 subskriboj de "Amikoj de Esperanto". Eĉ se ni ne atingos cent mil subskribojn, niaj klopodoj ne estas vanaj. Al ĉiu persono, kies subskribon ni varbas, ni devas klarigi kio estas Esperanto kaj kiom mirinde ĝi jam progresis. Eĉ se ni kolektas nur 50,000 aŭ nur 20,000 subskribojn, nia laboro alportos fruktojn - ĉar ni faris tiom da novaj amikoj por Esperanto. S-ano Stern volonte sendos al vi pliajn foliojn (enlistilojn) por kolekti pliajn 20 aŭ 100 aŭ 200 subskribojn.

Februaro kaj Marto, miaj du lastaj monatoj en Eŭropo pasis kun nekredibla rapideco. Venante de la bela Ĉeĥoslovakujo mi prelegis en Aŭstrujo, Svislando kaj Nederlando. - kun paroladoj ĉiu-tage. En Svislando mi havis nur du liberajn tagojn, du dimanĉojn. La unuan mi pasigis en St. Moritz kaj la alian en Genevo. En ĉiuj lokoj mi revidis malnovajn amikojn: neĝ-kovritajn montegojn, kaj grizharajn Esperanto-pionirojn. En Nederlando, la neŭtrala landa asocio "La Estonto Estas Nia" mirinde aranĝis mian vojaĝon tra ĉiuj interesaj provincoj. La prezidanto s-ro Baas, ankoraŭ same energie gvidas la ŝipon.

Sed oni ĉiam volonte revenas hejmen! Mia patrino kaj mi estis for de Usono dum preskaŭ 9 monatoj. En ĉiu vespero, en ĉiu lando, mi devis rakonti pri la bela lando Usono (500 memfaritajn lumbildojn), pri la usonaj Esperantistoj, kaj pri nia movado. Ili ĉiuj ŝategas aŭdi pri niaj progresoj. Ni ne rajtas malprogresi! Ni nepre devas progresi! La tuta mondo volas scii kiom EANA progresas de jaro al jaro. Ĉiu samideano kaj samideanino devas helpi per persista laboro en sia regiono, kaj per prompta pago de membrotizoj al la lokaj kluboj kaj al la landa asocio.

Joseph R. Scherer.

THE NAME OF EVERY MEMBER, not in arrears, will appear on the ESPERANTO 50 YEAR HONOR ROLL. You may not be present at the 75 year Jubilee-BUT coming generations will point to that 1937 HONOR ROLL, and say, with pride "Mother-Father-Grandpa-Grandma-Aunt or Uncle was one of those PIONEERS in the ESPERANTO MOVEMENT". Be sure your name is not omitted.

PROPOSED CONSTITUTIONAL AMENDMENT

After the 1935 congress of EANA held at New York, and after the several amendments to the Constitution there adopted, it was thought well to have the entire Constitution printed and distributed to the membership through the pages of Amerika Esperantisto. It is hoped that in general the members of EANA have preserved for reference the November 1935, issue of their official periodical, in which the Constitution was printed.

This year one small change in the wording (though not in the essential import) of Article VI, Section 2, is hereby proposed by the central office force of EANA, -- the proposed change to be voted on at the jubilee congress next July, -- so that the language of the Constitution shall harmonize with present facts, brought about through a practically unanimous referendum already conducted among the membership.

The occasion for this grows out of the fact that the world-federation of national Esperanto associations has found it necessary to reorganize itself under a new name, although without any change in officers and leaders or in essential plan and purpose. In this act of reorganization it disassociated itself from its former name of UEA, (Universala Esperanto-Asocio), and has taken the name of IEL, (Internacia Esperanto-Ligo.) The membership of EANA in a special emergency referendum decided overwhelmingly to participate in the reorganized federation, or "IEL", on terms similar to those on which it had been participating in the affairs of the previously functioning world-federation, ever since the 1933 world congress of Esperantists at Cologne introduced changes into the basic statute of UEA which gave it a more clearly federal nature. In our special referendum last autumn, conducted by mail, there were of course some members of EANA who did not think it essential to express themselves by mailing in their ballots. But of the large and satisfactory number who did vote, only two voted against the affiliation of EANA with IEL.

The amendment hereby formally proposed is in essence the substitution of appropriate reference to IEL for the reference to UEA, in the one section where such reference has occurred. It also fixes at 12 cents (present rate of exchange) EANA's payment for each of its members who remains an "inactive" member only of the Esperanto world-federation, whereas this payment since 1933 has heretofore been 15 cents.

The whole section, if amended as proposed, will read as follows:

"Article VI, Section 2. Regular members shall pay one dollar and fifty cents (\$1.50) a year, in case they shall desire, in addition to their E.A.N.A. membership, to be counted as "simple" (inactive) members of the INTERNACIA ESPERANTO-LIGO. Those members of E.A.N.A. who shall further desire to have one of the active grades of membership in I.E.L. - that is, as "member with yearbook" (MJ), "subscribing member" (MA) subscribing member (Heroldo)-(MAH), or "sustaining member" (MS), shall pay \$1.50 to E.A.N.A., in addition to the appropriate I.E.L. charges prescribed by that organization. For each E.A.N.A. member who remains only a "simple" (inactive) member of I.E.L., there will be paid to I.E.L., out of the \$1.50 membership fee received, the equivalent in U.S. money of one half English Shilling. Regular members of E.A.N.A. shall be entitled to all rights and privileges of the Association, including the receipt of its official organ or bulletin; also the right to vote; and eligibility to the elective or appointive offices of the Association, in such manner as elsewhere set forth in this Constitution."

BE ON THE HONOR ROLL of JUBILEE YEAR, by being a PAID-UP MEMBER of E.A.N.A.

ZAMENHOF - the honored name. Our April issue contained a notice of the expected and welcome visit to America of Miss Lidia Zamenhof, daughter of the "majstro." Her visit is for the purpose of teaching Esperanto by the conversational "Ĉe metodo," and is directly sponsored by the Bahai Spiritual Assembly for U.S.A. and Canada. But EANA wishes to cooperate in every effective way, and has appointed a special committee for that purpose. Chairman, Mr. S. C. Eby, 320 E. 42nd Street, New York City. Other members, Mrs. Della C. Quinlan, Brooklyn, N.Y., Miss A. Josephine Kruka, Washington, D. C.

Joseph H. Murray,

8198 Chamberlain Avenue, Detroit, Michigan.

Ago. 35

LA PROPAGANDO

Pripensante la propagandon, ŝajnas al mi ke ni unue devas konstati kelkajn faktojn. Jen la plej gravaj laŭ mia opinio. Propagandu Esperanton nur tiuj kiuj jam havas sperton pri ĝi. Bonaj propagandantoj povas esti nur tiuj kiuj jam konvinkigis ne nur pri la neceso de Internacia Helplingvo, sed kiuj plene konvinkigis ke Esperanto estas plej taŭga, kaj praktika solvo de tiu problemo. Tia konvinkigo povas esti atingita nur per propra sperto. Ni plene konstatu kion ni propagandas. Ĉu monda aŭ universala lingvo, kiel usona ĵurnalaro konstante misdiras? Tute ne. Ni propagandas LA INTERNACIAN HELPLINGVON ESPERANTO. Estas granda, kaj grava diferenco inter la signifoj de tiuj vortoj, kaj mi dubas ke ni en Usono ne sufiĉe akcentas tion. Kiam ajn ni propagandas al iu persono, aŭ personaro, ni frue eltrovu ĉu aŭ ne ili interesas pri la temo, se ne, oni ne insistu pri tio, kaj enuigu la aŭskultantojn, tiel ke poste ili evitos nin kiel eble plej multe, sed ni nur de tempo al tempo intermetu vortojn pri la ĝenerala problemo de internacia komprenigado, inter kiuj ne estas necese ke eĉ la vorto Esperanto sin trovu. Ni memoru ke posedante Esperanton, ni posedas juvelon, ni ankaŭ memoru "ne ĵetu juvelon al porko", t. e. ni estu elektemaj pri la personoj al kiuj ni propagandas. La kampo de la propagando estas dividita ĉefe inter tri partoj, internacia, enlanda, kaj loka. Ĉi tiuj tri kampopartoj ne estas plene apartigeblaj, ili ne estas sendependaj unuj de la aliaj, sed plene interdependaj, tiel ke ĉiuj estas same gravaj.

La internacia propagando restas in la manoj de niaj internaciaj organizaĵoj, t. e. I. E. L. --- U. E. A. kaj diversaj internaciaj fakorganizaĵoj. Unuavide, do, ni konstatas ke ni kiel individuoj, aŭ lokaj grupoj, ne povas multon fari tiucele, tamen restas kelkaj etaj faroj kiuj povas helpi al tio. Kiam ajn ni legas ke iu grupo okazigas letervesperon ni nepre tuj sendu aŭ leteron aŭ poŝtkarton. Malgranda, malkara servo kiu sendube helpas en la internacia propagando. Kiam ni legas ke iu urbo aŭ lando ĵus eldonis turisman folieton en Esperanto ni tuj petu tion, eĉ se la kosto estas 1-2 respondkuponoj. Tiucele ankaŭ multe helpas la korespondado. Niaparte ni de tempo al tempo ankaŭ okazigu letervesperojn.

La propagandado enlanda ĝenerale estas gvidata de nacia asocio. Ĝi devas profiti per la spertoj de la lokaj grupoj, de ĝi devas veni la inspiro necesega por la daŭro, kaj vigla funkciado de la lokaj unuoj. Ĝi devas prezenti novajn ideojn pri agado, organizi planojn pri atakado. Ĝiaj devoj estas multegaj, kaj tre pezaj. Sur ĝiaj ŝultroj restas la sorto de nia afero, kaj en la internacia agadkampo, kaj en la loka.

El la vortoj jam diritaj ĉu iu povas dubi pri la grava rolo kiun ludas la naciaj esperanto-asocioj? Do, klare la unua paŝo en loka propagandado estas la fidela subtenado de tiu asocio kiu tiom helpas al ni en nia loka agado. La malfacileco de la propagandado restas en unu sola fakto, nome ke la esperantistaro konsistas plejparte el homoj neriĉaj. Do, ni devas tuj forigi el niaj mensoj iajn ideojn pri grandskalaj, grandiozaj metodoj, kaj devas kontentigi pri tre malrapida, ofte malkuragiga laborado. Usonaj ĵurnaloj, precipe en la grandaj urboj, ne estas tre simpatiaj al nia afero. Pro tio la provo aperigi artikolojn pri Esperanto ofte estas vana. Ekzistas alia metodo. Kelkaj ĵurnaloj havas rubrikon por leteroj de siaj legantoj, oni uzu tion laŭeble. Kiam aperas artikoloj pri paco, internaciaj aferoj, aŭ lingvistudado, oni sendu leteron kaj iel sukcesu menci i Esperanton. Aliaj ĵurnaloj havas "demandskatolon", sendu al tiu demandojn kiuj necesigos la mencion de la lingva problemo. Ni ĉiam respondu al artikoloj kiuj kontraŭas aŭ la internacilingvan ideon ĝenerale, aŭ Esperanton mem, ĉu ni havas esperon ke nia respondo estos presita, ĉu ne. Ni ĉiam portu la stelon. Aŭtomobilposedantoj same portu la stelon aŭ la vorton Esperanto ie sur la aŭtomobilo tiel ke ĝi estos facile videbla. Ni zorgu ke kelkaj bonaj libroj en Esperanto estu facile videblaj sur niaj librobretoj. Ni organizu ekspoziciojn laŭ jena aŭ simila ideo. La loka grupo aŭ ties anoj arigu decan libron. Tiujn librojn oni zorge elektu. Preferinde ili estu verkoj bone konataj, bone presitaj sur bona papero, kaj dece binditaj. Nur tiaj libroj interesas al la usonano, kiu jam de longe kutimiĝis al legaĵoj el bonaj materialoj. Ili

La Propagando (Continued)

estu diversaj laŭ enhavo. Sciencaj verkoj, religiaj, literaturaj, lernolibroj, kaj vortaroj, kaj vojaĝlibroj. Oni ankaŭ havigu al si aron de turismaj folioj. Tiuj ĉiam allogas, ĉar ili enhavas bonajn ilustraĵojn, estas bone presitaj sur bona papero, ili krome plej bone atestas la praktikan utilecon de nia lingvo. Farinte tiujn preparojn oni nun trovas sin ĉe la tasko. La celo, kiel vi jam divenis, estas interesigi iun butikiston tiel ke li volonte permesos la ekspoziciadon de tiuj aĵoj dum kelkaj tagoj, eĉ eble dum plena semajno. Malfacila klopodo, sed eble ne tiom malfacila kion ni unue pensas, ĉar la butikistoj ĉiam serĉas novaĵojn por ekspozicii en siaj fenestroj, kaj tiel alogi la publikon. Por ke ni akiru kiel eble plej multe da profito el tiu klopodo, estas dezirinde doni kvanton de propagandaj folietoj al la butikisto. Tiuj kuŝu sur montrotablo tiel ke interesato povu preni sen ia ajn ĝeno. Apude estu skribpapiro sur kiu la interesato povu skribi sian nomon kaj adreson se li volas. Nature la propagandiloj surhavu la nomon kaj adreson de la grupsekretario. Granda laboro, certe jes, sed imagu se vi unufoje sukcesus pri tio!! La materialoj jam estas pretigitaj, kaj oni, sen tre multe da plia laboro povus okazigi similajn ekspoziciojn, en aliaj butikoj, bibliotekoj, preĝejaj bazaroj, laboristaj rondoj, eĉ eble en lernejoj. Ni ne okazigu publikajn kunvenojn! Tiuj indus nek la laboron nek la koston. Anstataŭ tion fari, ni utiligu jam ekzistantajn organizaĵojn laŭeble, -- preĝejaj societoj pri literaturo, debatado, aŭ diskutado. Ekzistas multe da tiaj societoj en ĉiu urbo, kiuj sopiras parolantojn sen ia pago. Aliaj organizaĵoj estas: - Skoltaro, Rotary, League of Nations Societies, porpacaj asocioj, kaj ĉiu asocio kiu havas internaciajn celojn. Se oni sukcesas, la problemo altiri la publikon jam estas solvita, ĉar tiuj asocioj jam havas sian propran publikon.

Kiam ni faras propagandajn paroladojn ni evitu longajn paroladojn pri la neceso de internacia helplingvo. Multe pli bone estas akcentu la progreson jam faritan. Ni por vortbaldon de la mondo kiel ĝi estu post kiam internacia lingvo jam estos plene akceptita, t. e. klarigu la bonon kiu rezultos el tiu akcepto. Fine, provleciono. Ofte provleciono havas multe pli da intereso por la atŝkultantaro ol la plej bona prilingva parolado. Oni provu fari interkonsenton kun la urba ĉefbibliotekisto pri la aperigo sur la gazetbretoj de la ĉefa publika legoĉambro de Esperanto gazetoj. Mi sugestas ke la lokaj grupoj abonu "bonajn gazetojn", - en angla kaj Esperanto. Tiu ĉi gazeto estu liverata al la grupsekretario, kiu surstamos la nomon de la grupo, sian propran nomon kaj adreson kaj tiam transdonos al la biblioteko por aperigo. Tiel, per malmulta laboro, kaj kompare malalta elspezo (ĉirkaŭ \$1.) oni konstante atingas la publikon, kaj ĝuste tiujn personojn kiujn ni volas interesigi en Esperanto.

 CAN YOU IMAGINE ANYTHING MORE INTERESTING than getting the NEWS of what people of 60 or 70 other countries are doing - especially other ESPERANTISTS; of what the governments of the world are doing about ESPERANTO - as you perhaps know, some of them have taken it up in a big way, using it officially. Become a member, not only of E.A.N.A. but also of the International Esperanto-Ligo, including the Yearbook, and either the weekly "Heroldo de Esperanto" or the monthly "Esperanto-internacia". These papers circulate in nearly 70 countries, and are of absorbing interest. The Yearbook, or either of the papers are worth the price of all. See combination rates on Green Page.

"NEW YORK FILIO" de LEANA kun la oficiala kunlaboro de "Harmonio" kaj aliaj grupoj aranĝos grandskalan festenon Majo 15-an en la impona kaj belega danchalo de la REVUELTA STUDIO, 133 East 61st Street, between Park and Lexington.

ALL NOT IN ARREARS June 1st will have their names on the JUBILEE YEAR HONOR ROLL.

WINNERS IN OUR ESSAY CONTEST

In our February number we announced that nineteen Esperanto books (donated anonymously by a samideano in the middle west) would be divided among several who should submit the most meritorious short essays in Esperanto. The quality and interest of the competing papers has been gratifyingly high; and we hope to be able to publish, one at a time through the coming months, all of the essays that have won a "first prize."

Three of the winners named below have described their personal experiences in world-wide correspondence through Esperanto. The others wrote on problems in organization or in propaganda. Comparison between such different types of offerings is not easy, as each is so valuable and interesting in its own sphere. However, the committee of judges is unanimous in announcing the following awards.

(A) In the general or open contest, not restricted as to age, there were three papers so nearly equal in merit that instead of awarding one first prize of six books and a second prize of three books, it is decided to call it a "tie race" and to award three "first prizes" of three books each. The winners are:

Miss O. V. Marsh, Long Beach, Calif.-G.B. Wrenn, Ashland, Ohio.-J.H. Murray, Detroit, Mi.

(B) In the contest limited to persons below the age of thirty, the first prize (four books) goes to Charles E. Simon, Cleveland Heights, Ohio, age 20; and the second prize (two books) to M. Jagoda, Brooklyn, N.Y., age 28.

(C) In the junior contest, limited to young Esperantists below the age of 20, the first prize (three books) is awarded to Thomas Goldman, age 18, of Harvard University, (home, Washington, D.C.,) and the second prize (one book) to William Vathis, age 17, of Tamaqua, Pa.

(D) Besides the above, special honorable mention is given to an account of personal experiences by Capt. F.A. Postnikov, Little Rock, Ark., who was one of the pioneers of Esperanto in Japan, in Russia, and in California. This paper was received too late to be considered under the terms of the competition, as announced; but we expect to publish this valuable historical document in the autumn. And a special book-premium of value, furnished by a samideano in Washington, will be sent to Captain Post, (as he is more commonly named in Usono, the land of his adoption.) as a token of EANA's appreciation.

Elsewhere in this issue, please read carefully the prize essay of Joseph H. Murray--remembered as the efficient chairman of the LKK for the Detroit kongreso of 1936.

ESPERANTO KLUBO de EMPORIA - a new club just formed in Emporia, Kansas, Consisting of 14 members-13 to 14 years of age. Sammy Martin President; Marjorie Davis V-President; Secretary Jerry McConnell; Asst Sec'y Kenneth Brewer; GEFEPVORULOJ. Barbara Thomas; Margaret Jean Fleming; Dorothy Lou Phillips; Jean Schoech; Ina Lou McKim; Dora May Addington; Molly Lou Jordan; Laura Fry; Billy Clay and C.S. Clay. This club of enthusiasts is the result of an article by Dr Lehman Wendell, Minneapolis, in a stamp magazine. Sammy Martin saw it-got busy, and with the advice of such stalwarts of Esperantujo, as Rev. John H. Fazel, San Antonio, Texas, and Capt. F. A. Post, Little Rock, Ark. formed a class-and club-and joined the EANA. WELCOME AND BEST WISHES.

Se ne estas Delegito en via Urbo, Urbeto aŭ Vilaĝo, Kaj vi estas preta, kaj kapabla tiel agi, bonvole sciigu la Centran Oficejon, Ĉiu loko devas havi delegiton.

KURSGVIDANTOJ ATENTU! Ni helpos al vi dum la kurso kaj sendos donacon por via lernantoj. Skribu al K. Kalocsay, Hungarujo, Budapest VIII, Maria-u 34.

BE SURE OF YOUR PLACE ON THE JUBILEE HONOR ROLL by HAVING 'PAID-UP' CARD-EANA and IEL

EVERY ESPERANTIST SHOULD BE A MEMBER OF EANA AND IEL AND BEING IN A POSITION TO

WASHINGTON INVITES YOU TO THE XXX ESPERANTO-ORA JUBILEE-FIRST WEEK IN JULY 1937

★ JUBILEA ★ JARO ★

NORTH AMERICAN ESPERANTISTS WILL HOLD THEIR THIRTIETH ANNUAL CONGRESS IN WASHINGTON, D. C., July 1, 2, 3, 1937. They will also celebrate the 50th YEAR since the WORLD AUXILIARY LANGUAGE ESPERANTO WAS PRESENTED TO THE PEOPLE BY DR. L. L. ZAMENHOF. THIS GOLDEN JUBILEE OF THE ESPERANTO MOVEMENT will be celebrated in every country on the globe. Every one interested in Esperanto will want to be known, in the years to follow, as a participant in the GOLDEN JUBILEE OF ESPERANTO. BE READY! Whether or not you are sure of being with us, send for your Kongresa Bileto without delay - Local Congress Committee can use the money to finance preparations - Money order, Check, Cash or \$3.00 worth of postage stamps. Congress Committee: Chairman, Mrs. C. J. Walter; Secretary, Kenneth F. Rogers; Treasurer, Miss Kathleen A. Prutz. Address all communications to 1517 H St., N. W. Washington, D. C. * * * * * CONGRESS HEADQUARTERS * HAMILTON HOTEL, 14th & K Streets, N. W.

All outside rooms, equipped individually with controlled air-conditioning, full-sized tub and shower, circulating ice-water, reading lamp and full-length mirrors. Esperanto Hall entrances from street and lobby. Rates: Single, \$3.00 and up; Double, \$4.50 and up.

WELCOME TO BEAUTIFUL WASHINGTON
WE AWAIT YOU WITH OPEN ARMS - AND HEARTS

PROGRAM OF THE JUBILEE CONGRESS, WASHINGTON, D. C., JULY 1-3, 1937

(Subject to minor change)

Wednesday, June 30. Hotel Hamilton, all day -- registration of arriving samideanoj. 8:00 P.M. "Antaŭkongresa Kunveno." (Social greetings; informal entertainment; mass singing from song sheet.)

Thursday, July 1. 8:00 registration of arriving samideanoj. 9:00-9:15 music. 9:15 "Malferma Kunsido." (Formal greetings; reports of officers and committees; congress committees appointed.) 2:00 "Dua Laborkunsido." (Reports and business continued). 8:00 "Tutesperanta Vespero" (Ten-minute Esperanto addresses on live topics by speakers invited in advance; three-minute talks by volunteer speakers.)


Friday, July 2. 9:00-9:15 music. 9:15 "Tria Laborkunsido." (Plans for advancement of "nia movado.") 1:30 "Ĝenerala Ekskurso." (Free to all congress members) Personally conducted tour of Government buildings and other "vidindaĵoj." Photograph of congress taken en route. 8:00 Public meeting. (Varied program, to interest non-Esperantists and Esperantists.)

Saturday, July 3. 9:00-9:15 Community singing from song sheets. 9:15 "Fina Laborkunsido." (Election of officers. Reports of congress committees. Final business.) Afternoon: conferences of new committees and officers. Also, "neformalaj ekskursoj" for those who wish, (sightseeing a la carte for small groups, with guides.) 8:00 "Kongresa Bankedo." Informal (Followed by dancing.) \$2.25 per plate.

Sunday, July 4. "Postkongresa Tago." No formal prearrangements. If groups of visiting samideanoj staying over desire to visit near-by attractions, such as Mount Vernon, Great Falls, or the Franciscan Monastery, parties may be made up informally, (travel at each participant's expense,) with a local samideano as nucleus.

AL LA USONA

Cu vi intencas iri kongres-
 ĉijare? Se jes, aĉetu viajn
 surŝipe, aere aŭ omnibuse.
 VILLEMEN TRAVEL SERVICE



New York City, N. Y.


SAMIDEANARO

on, naciaj aŭ internaciaj,
 biletojn por vojaĝo, ĉu
 ĉe la
 145 East 57th Street,


Kie oni korespondas en
 La VILLEMEN TRAVEL SERVICE

ESPERANTO

interrilatas kun ĉiuj vaporsiplinioj, transoceanaj kaj
 marrandaj, kaj povas pro siaj bonaj
 personaj rilatoj kun la oficistoj de
 la diversaj linioj, akiri la plej bon-
 ajn servadojn por vi.



Adresu vian korespondojn al : -
 F-ino Louisa J. Hertweck, c/o -
 VILLEMEN TRAVEL SERVICE



145 East 57th St., New York, N.Y.

"THE TEXAS ESPERANTIST" (No.1, Vol 1) official organ of the newly organized Esperanto Association of Texas, (Mi legis ĝin "de koverta ĝis koverta"), tells of the enthusiastic meeting of Esperantists March 27th, in the YMCA San Antonio, to organize a society for the purpose of making Texas Esperanto conscious. It starts with 40 charter members - 25 present, and 15 by mail - many others were there in spirit, with "bondeziroj". Meeting opened with a banquet (E A T), songs, and speeches - Esperanto kompreneble. Address of welcome by Mr. William Plampin, of San Antonio, and response for visitors by Miss Philippa Stoneham, of Bryan. Informal greetings by John K. Halter, R. F. Musgrave and Billy Hunt, San Antonio; principal address was by Mr. Kaname A. Susuki, of Orange; Dr. E. D. Chase, of Galveston - one of "old time Esperantists" urged all - especially the young folks - to 'get busy' - study and practice la kara lingvo. The following officers were elected: President, Rev. John H. Fazel, 511 West Woodlawn, S. A.; 1st V-President, Miss Philippa Stoneham, 3410 E. 30th St., Bryan; 2nd V-President, K. A. Susuki, Box 633, Orange; Sec-Treas., William Plampin, 1032 S. Alamo, S. A., Executive Committee, Bruce W. Jones, George F. Carson and Mrs. Louise Dimaline - all of S. A., Serg-at-arms, Dr. E. D. Chase, Galveston. Bryan sent the largest delegation - Miss P. Stoneham, Miss Jewel Stewart, Mr. and Mrs. Glen Stinnett. A beautifully designed program and banquet folder, (white with green lettering and decorations), and a white silk ribbon tastefully decorated with Green Star and lettering, made up the principal-decorations. They have a very nice letterhead - with the added line "Affiliated with EANA" (sincerajn dankojn). Rev. Fazel teaches classes Tuesday and Thursday mornings, and Mr. Plampin on Sunday afternoon. A striking example of Texas-Esperanto enthusiasm and cooperation, was Mr. Susuki's trip to Bryan (many miles from Orange) to assist the fast growing Esperanto class recently organized and taught by Miss Philippa Stoneham and Mrs. Glen Stinnett. The San Antonio press was generous and commendatory towards the new Society.

The "American Weekly" (Sunday supplement to Hearst papers) April 18th, has a page of photographs of grasshoppers ingeniously posed as humans - Picnickers, checker and croquet players, an astronomer and a farmer. What of it?? - the author is our Dr. Lehman Wendell, Dentist and Author, Minneapolis. To Esperanto readers of his "Sub la Meznokto Suno", "Sep Ridoj", and other amazing, instructive and otherwise interesting articles in various magazines, this 'hoppergrass stunt' is an additional evidence of his scientific versatility. In pleasant anticipation we await - What next?

HO SAMIDEANOJ, ne permesu ke timo ke la ĉefhotelo estos eble tro plena detenu vin for la Kongreso, ĉar estas aliaj bonaj hoteloj-komencantaj je unu dolaro potage.

ESPERANTO KLUBO de MILWAUKEE has recently moved into new quarters-in the new International Institute of Milwaukee, at 787 N. Van Buren St., Secretary Mrs. Blanche Dickau, 2669A No. 33d Street.

ARNHEM (NEDERLANDO)

Mondfama




NUN, la Granda Karavano Trairos ESPERANTUJO

Kie vi renkontos amikojn el multaj landoj



P
A
R
I
Z
A

Eifel
Turo.




E
K
S
P
O
Z
I
C
I
O

Kelkaj el niaj eminentuloj jam aliĝis, kaj alvokas vin, farigu grandan Usonan Deleĝitaron unufoje ĉe eksterlanda Kongreso. Multaj gajaj Esperanto-vesperoj estos ĝuita survoje tra Esperantujo. Estas grandega okazo por perfekti vian Esperanton.

Ni gajvivos naŭ tagojn en Skandinavujo, dek-kvin en Sovetlando, semajno ĉe la Jubileo, kaj dek-unu en Centra Europo kaj Francujo. (Post kongreso vi povos ĉeesti je Esperanto-Domo en Nederlando anstataŭ Centra-Europo.)

Tuj post la Vaŝingtono-Kongreso ni ekiros en la M. S. "Batory", Iri de Nov-Jorko, Julio 4, reiri Sep. 3.

"M. S. BATORY"




La Kosto de la vojaĝo, tutinkluzive al Varsovio, kun tuta transportado de Nov-Jorko al al Nov-Jorko, estas nur \$ 446. en la Tria Klaso, kaj \$ 612. en la Dua K.

AL IĜU TUJ - Adresu korespondojn al

GEORGE A. CONNOR, Turismo Deleĝito de I.E.L.

30 Perry Street, New York City.

VARSOVIO



Oh no, this is not "just another of those tours". It's unique - or perhaps we might say also, the leader is unique -- not of the 'personally conducted tour' variety. Mr. Connor is a teacher in the Lew Wallace Junior High School of New York. (In addition to regular subjects, he teaches Esperanto classes two periods each week - during regular school hours, an official part of the school program. His pupils are tested scientifically by the Linguistic Research Dept. of I.A.L.A. He also teaches Esperanto to a group of Boy Scouts.) He has been 'around the world both ways, and has previously conducted three tours through the same lands now to be traversed. These tours were in response to the earnest solicitations of people knowing him best. Fortunate indeed are the people composing this caravan, under the guidance of one as familiar with the lands to be toured, as is the front lawn to many a home lover. He has traveled much and lived several years in those lands - two years in Russia. His personal acquaintance with hundreds of people enables him to take his groups into intimate contacts with the homes and lives of friends, spending delightful evenings, and meeting folks as they really are - know how they live, work, play, think and plan. His mastery of languages eliminates the talk difficulty. Without such knowledge as he possesses, little can be learned of the heights and depths, the sunshine and shadow of the people - this is especially true of the Soviets, amongst whom the company will spend two weeks. Such experiences as await this company would not - could not - be imagined of the usual 'personally conducted' tour. Knowing the personality and the genial, happy disposition of several of the folks who have already joined, we feel assured that a most enjoyable two months will be spent in an atmosphere of understanding, friendship and congeniality. -- And "Oh say can you see" the wonderful opportunity to perfect your Esperanto, with Gefervoruloj daily and a whole week at the Esperanto Domo? DO NOT MISS IT. Where we go: Poland, Russia, Austria, Hungary, Holland, France, Czechoslovakia, Finland, Denmark, Sweden. Oh Boy! !

VENU AL VAŜINGTONO LA BELA - - - NI ATENDAS VIN KUN MALFERMITAJ BRAKOKJ - VENU!

ALWAYS CARRY THE GREEN STAR-the Magic Key to Human Hearts-the Esperanto Emblem in the buttonhole. Every esperantist should proudly carry it. Green star with golden "E" and golden protectors on points. Choice, screwback 40¢, Safety catch 50¢. Esperantists and Friends of Esperanto. W E A R T H E M.

Membership Rates

- M - EANA and IEL, with "American Esperantist". \$1.50
- MJ- EANA - IEL, with "American Esperantist" and Jarlibro 2.50
- MA- EANA and IEL, with "AE" Jarlibro and "Esperanto Internacia" (Monthly). . . 4.00
- MAH-EANA and IEL, with "AE" Jarlibro and weekly "Heroldo de Esperanto" 6.50
- MS -EANA-IEL-Jarlibro, may receive both weekly and monthly publications, or may elect to receive instead of the weekly "Heroldo de Esperanto" a selection of book premiums from an already published list - ask for it. . . 8.50

The Jarlibro (Yearbook) is a directory of Esperanto Delegates in all parts of the world. Esperanto organizations, publications, and all sorts of information necessary to any one wishing to "BE UP" on Esperanto affairs.

 TEXTBOOKS: "Practical Grammar" by Dr. Ivy Kellerman-Reed, member of the World Language Committee. A course suitable for all grades. The most popular textbook on the American Market 75¢

 FRODING'S "Easy Course in Esperanto" - a splendid 'starter' of 8 lessons. 10¢

 SUSSMUTH'S "American Esperanto Key" - Grammar and Vocabulary" 5¢

 "EDINBURGH POCKET DICTIONARY" 288 pages, size 4x6, indispensable to any Esperantist, You will want one eventually - GET IT NOW. \$1.00

 MILLIDGE Esperanto-English Dictionary \$2.75

 Easy and interesting reading "Fabloj de Ezopo" . . . 25¢ "Zamenhofa Legolibro" . . . 50¢

 "Sub la Meznokta Suno" (Wendell) 25¢ "Sep Ridoj" (Wendell) . . . 25¢

 "Facilaj Esperantaj Legaĵoj" 50¢ La Vojo Returne (Remarque) \$2.00

 "Akrobato de Nia Sunjerino (Payson) . . . 25¢ "Ginevra (Privat) 25¢

 Blanche, Virgulino de Lille (Payson) . . . 25¢ "Miserere Kaj Thais" (Payson) 25¢

 Dua Kreanto, Poemo 10¢ "La Karto Mistera" Tre intriganta 25¢

 Infanmurdo (Japanese drama) 25¢ "Unua" 10¢

 Juneco Kaj Amo (Boards) . . . 25¢ Paper . . . 15¢ Short Outline of Esperanto 10¢

 Lando de Argenta Akvo (Roe-Payson) . . . 15¢ Radio Manuelo 25¢

 Mopso de la Onklo (Chase) 15¢ Jos. Rhodes "Early Days of Esperanto in England" (Esperanto) Cloth \$1.00

 Princo Vanco (Putman Kaj Beetes) 25¢ Paper, 75 cents.

 Rozujo Ĉiumiljara (Wagnallis-Payson) . . . 35¢ "Piramo kaj Tizbeo" (W.G. Adams) 10¢

 Raknonto kaj Aventuro (Hall-Bacoll) . . . 15¢ Surprises at Sylvia Farm (H.W. Fisher) . 10¢

 Taso de Amservo (Taylor-Weems) 25¢ "Guide to Esperanto" (former price . . . 25¢) 15¢ - This book is for self instruction class use, and correspondence work, as well as to guide the Esperantist in the study, teaching, use and propaganda of Esperanto. Only a few left - H U R R Y ! ! !

 "Fundamento de Ispografio" by Fred A. Hamann . . . 55¢ - La baza libro, de IPSO aŭ Internacia Steno-Pazigrafio, kiu signifas internacia mallongskribo por ĉiuj kaj estas intencata fariĝi la dua skribo por ĉiuj, simile al Esp-o, la dua lingvo por ĉiuj.

 Guide to English Ispography (For acquiring speed) 60¢
 Slosilo de Esperanta Ispografio 10¢ Key to English Ispography 10¢
 Schlüssel der deutschen Ispografie . . . 10¢ Clave de Ispografia Espanola 10¢
 Correspondence course in Ispo, Including books \$2.00

 ADVERTISING. Small ads., 1¢ per word - minimum 25 words. Space 1x3 1/2 inch, 50¢--3 times for \$1. Full page \$4. - special on several issues.

 NI ATENDAS VIN KUN MALFERMITAJ BRAKOKJ - VENU AL VAŜINGTONO LA BELA

 Esperanto Association of North America 1517 H. Street, N. W., Washington, D. C.
